

Nikolaus Lenau,  
Ĉiel-malĝojo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Migradas penso surĉielvizage,  
La morna, griza, peza nubo jen;  
Arbed' envente frenezulmalsaĝe  
Sin ĵetas tien-renn en ĉagren'.

Eksonas bruo de l' ĉielo kiel  
Malforta ĝemo de melankoli',  
- okul' ploronta ekrigardas tiel, -  
El ĝi ekbrilas febla lumradi'.

De l' marĉo fridaj trem-aeroj vente  
Alblovas supererikeje nun;  
De la ĉielo trista senatente  
Elmane falis la lasita sun'.

*Traduko de la Germana poemo "Himmelstrauer" de NIKOLAUS LENAU (\*1802-08.13 - †1850-08-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-627-1268 (2012-10-26 14:09:29)*

*Pri la poeto vidu la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Nikolaus\\_Lenau](http://eo.wikipedia.org/wiki/Nikolaus_Lenau).*